WIKIPEDIA

Palatinata germana dialektaro

La **palatinata germana lingvo** (*Pfälzisch/Pälzisch*) estas dialektaro de la germana lingvo parolata precipe en la geografia regiono Palatinato, la suda parto de la federacia lando Rejnlando-Palatinato de Germanio, inter la rivero Rejno oriente kaj la limo al Sarlando oriente. Pliaj parolantoj ankoraŭ troveblas en la orienta parto de Sarlando kaj en la teritorio ĉirkaŭ la urboj Mannheim kaj Heidelberg en plej norda Baden-Virtembergo.

La dialektaro divideblas en okcidentan formon, nomatan *Westpfälzisch*, kaj orientan formon, nomatan *Vorderpfälzisch*. La lingvo estas la precipa fonto de la pensilvanigermana lingvo en Usono, kiun plejparte vivigis germanaj elmigrintoj el la historia regiono *Kurpfalz*, kiu krom el la nuna geografia regiono Palatinato ankaŭ konsistis el la norda parto de Baden-Virtembergo kaj la nuna distrikto Bergstraße, la plej suda parto de Hesio: la areo fakte identas al la moderna metropola regiono Rhein-Neckar.

Ekzistas vikipedio en la palatinata germana lingvo, kiu en februaro 2012 havis iom pli ol 1700 artikoloj.

palatinata germana	
Pfälzisch/Pälzisch	
Parolata en	Palatinato (la suda parto de la lando Rejnlando-Palatinato de Germanio)
Parolantoj	1 000 000
Denaskaj parolantoj	ĉ. miliono (takso)
Skribo	Latina alfabeto
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	pfl
ISO 639-3	pfl
SIL	PFL (http://www.sil.org/iso639-3/documentation.asp?id=pfl)
Glottolog	pala1330
Angla nomo	Palatinate German
Franca nomo	palatin
Vikipedio	

Jen iuj ekzemplaj vortoj, kun komparo al la germana kaj nederlanda lingvoj:

Vorderpfälzisch	Westpfälzisch	Germane	Nederlande	Esperantlingve
Mais	Mais	Mäuse	Muis	musoj
Lais	Lais	Läuse	Luis	afidoj
Grumbeer	Grumbeer	Kartoffel	Aardappel	terpomo
Schnoog(e)	Stechmigg	Mücke	muskiet/mug	kulo
Bääm	Bääm	Bäume	boom	arboj
Schdää	Schdää	Stein	steen	ŝtono
soi	sei	sein	zijn	lia
unser	unser	unsere	ons	nia
net/nit	net	nicht	niet	ne
dowedder	degeche	dagegen	tegen	kontraŭ
Fusch	Fisch	Fisch	vis	fiŝo
ebbes	ebbes	etwas	iets/wat	io
Ärwett	Arwett	Arbeit	werk	laboro
Dor	Dor	Tor	deur	pordo
Abbel	Abbel	Apfel	appel	pomo
hawwe	hänn	haben	hebben	havi

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Palatinata_germana_dialektaro&oldid=5770839"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 15:17, 29 okt. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.